

KOMENCANTO

gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



Vinnikova Nina
[Novoaltajsk, Rusio]

Atendante printempon

2002

Renkonte la Jaron de Ĉevalo — literatur-historiaj paĝoj
poetike — amuza gramatiko — distraj rakontoj — tempo:
filozofie — aforismoj — anekdotoj — enigmoj — invitoj kaj
informoj — anoncetoj — korespondu!

1

Perantoj de KOMENCANTO

ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian gazeton

Argentino Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

Aŭstralio Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000, Antwerpen

Brazilo Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

Britio Esperanto-Asocio de Britio, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DG

Ĉeĥio Vladislav Hasala, A.Dvorĥka 1, CZ-696 62 Strŕznice

Danio Revuservo de Dana Esperanto-Asocio Frederik Eriksen, Finscmsgade 10, DK-4800, Nykobing F.

Estonio Virve Ernits, Mahla 65 — 1, EE — 0012, Tallinn

Finnlando Heta Kesala, Kalamiehenkuja 3 D 32, FI-04300, Tuusula

Franco ~ Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

~ R.Melo, 34, Av. de Russie, FR-03700, Bellerive S/A

Germanio Dr. Wolfgang Schwanzler, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

Hispanio Pablo Vicente Valero, adv, Obispo Qucsada n=BA14, 6D, ES-40006, Segovia.

Irano Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

Italio Itala Esperanto Federacio, Via Villoresi, 38, 20143, Milano.

Italio, Kroatio, Slovenio

Viŝnja Brankoviĉ, Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste

Katalunio Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

Kubo Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, HAVANO

Litovio Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

Norvegio Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 OSLO

Pollando Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

Svedio SEF, Lisbet Andreasson, Sodra Rorum pl 455, SE — 24294 Horby

Svislando Christoph Scheidegger, Im Schleedorm 6, CH — 4224 Nenzlingen

Usono

Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

redakcie

Karaj legantoj!

En viaj manoj troviĝas la unua kajero de "K"-2002 en ĝia nova aspekto. La kajeron malkovras bildo de Vinnikova Nina el Rusio "Atendante printempon". Kaj la Jaron de Ĉevalo ni renkontas per amuza rakonto "Senkosta ĉevalo".

Niaj literatur-historiaj paĝoj komencas priskribi sovetan skolon en E-literaturo. Post ili sekvas bele ornamitaj lirikaj poemoj. Amuza gramatiko iĝas nia tradicia rubriko. Distraj rakontoj – okazintaĵoj el realo es-pereble plaĉos al vi kaj ankaŭ vi povas rakonti pri io amuza el via persona sperto.

Nia nova temo, al kiu ni invitas vin kontribui – Tempo. Tradiciaj aforismoj, anekdotoj kaj enigmoj kun amuzaj bildoj situas ĉe kuintima loko. Ankoraŭ unu nova rubriko "Invitoj kaj informoj". Korespondadresoj kaj anoncoj kutime fermas la kajeron.

Agrablan legadon!

Restu kun ni en 2002!

DANKON al Bill Thorne [Londono, Britio] pro 20pundoj donace al KOMENCANTO!

KOMENCANTO

2002 numero 1 // (33) // 6 numeroj jare
regule aperas ekde 1997

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev
konstanta kunlaboranto: Rafija Jafasova
adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: let@e-burg.uralpost.ru

abontarifo por 2002:

internacia tarifo: 15 eŭroj aŭ \$15;

orient-eŭropa kaj latinamerika tarifo: \$13;

aŭ por ĉiuj — 16 IRK.

konto ĉe UEA: vkud-a

rusia tarifo: 120 rusiaj rubloj poŝtmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,

Екатеринбург, аб. ящ. 132.

Oni rajtas uzi bildojn kaj verkojn el "K".

La sola kondiĉo – nepre mencii KOMENCANTO'n, la nomojn de la aŭtoroj kaj ties loĝlokojn.

Karaj legantoj!

Certe, vi scias, ke en februaro startis, laŭ la Orienta kalendaro la Jaro de Ĉevalo. Sendube la ĉevalo estas estaĵo ĉarma, forta kiel besto kaj facila kiel birdo. Ne ŝajne kiel simbolo de poetika inspiro servas la facilflugila ĉevalo Pegaso. Ni deziras al vi, karaj, ke ĉi-jare vin vizitu la krea inspiro kaj ĉiu ielmaniere kontribuu al nia komuna revuo.

Koncerne la Jaron de Ĉevalo ni komencas publikaĵojn en "K-2002" de humura rakonto pri ĉevalo.

Teffi (pseŭdonimo de konata rusia verkistino N. A. Buĉinskaja, 1872-1952) Esperantigis **Jafasova Rafija**

Senkosta ĉevalo

Nikolao Ivanoviĉ Utkin, malgrava akciza oficisto en malgranda distrikta urbeto, aĉetis unurublan bileton ĉe la guberniestrina loterio kaj gajnis ĉevalon.

Nek li mem, nek la ĉirkaŭantoj ne kredis je tian feliĉon. Tre longe oni kontrolis la bileton, miris, oh-is. Fin-fine oni fordonis la ĉevalon al Utkin.

Kiam la unua ĝojo kvietiĝis, Utkin enpenŝiĝis.

"Kien mi ĝin metu? — pensis li. — La apartamento mia estas ofica, ...unu ĉambro kaj kuirejo. La remizo por lignaĵoj estas eta, nur por tri manpakoj. Sed la ĉevalo estas animalo sentema, ne eblas ja ĝin lasi surstrate".

La amikoj konsilis peti ĉe la ofic-estraro apartamentan monhelpon.

— Rifuzu vi de la ofica apartamento. Provu lui eble malpligrandan, sed kun remizo. Kaj se oni rifuzos — diru, ke ja ŝanĝiĝis familiaj kondiĉoj, hm... pligrandiĝo de la familio okazis.

La ofic-estraro komprenis. La monon donis. Utkin luis apartamenton kaj starigis la ĉevalon en la remizon. La apartamento kostis multe, la ĉevalo manĝis multe, kaj Utkin komencis ŝpari — ĉesis fumi.

— Belan ĉevalon vi havas, Nikolao Ivanoviĉ, — diris la najbara butikisto. — Nepre oni forŝtelos ĝin de vi.

Utkin maltrankviliĝis. Li aĉetis specialan seruron por la ĉevalejo.

... Ĉiŝtatene kuris li al sia ofico, kaj la butikisto lin salutis kaj karese demandis:

— Ĉu ne forŝtelis oni la ĉevalon? Nu, nepre forŝtelos, nepre! Por ĉiu evento taŭga momento!

La ĉevalo manĝis ege multe. Utkin timis ĝin kaj en la ĉevalejon ne venadis. "Povas per hufo bati, la graso bestaĉo. Kaj kiu kulpos?"

Sed fieris li antaŭ ĉiuj kiel antaŭe.

— Mi ne komprenas, kiel povas homo, kiu havas certan enspezon, vivi sen propraj ĉevaloj. Kompreneble, estas multekosta plezuro. Sed kiel oportuna!

Li ĉesis aĉeti sukerojn.

Foje venis en la korton du fraŭloj, petis la ĉevalon rigardi, cele — aĉeti. Utkin forpelis ilin kaj longe kriis, ke al li por tiu ĉevalo oni mil rublojn proponis, sed li eĉ marĉandi ne volis.

Ĉion ĉi aŭskultis la najbara butikisto kaj kapbalancis.



— Vane vi tiel faris, ili ja eĉ pli forte ekinteresiĝos pri via ĉevalo. Vi mem komprenu, kiaj aĉetantoj ili estas!

— Kiaj?

— Tiaj, ŝtelistoj. Ĉevalŝtelistoj. Vizitis kvazaŭ rigardi, sed nokte venos kaj forŝtelos.

Denove maltrankviliĝis Utkin. Renkontis lin konata telegrafisto. Eksciis pri la afero, konsolis lin kaj promesis helpi.

— Mi, — li parolis, — tian aparaton starigos, ke se iu en la ĉevalejon venos — la sonoro-resonoro tra la tuta domo ektondros.

Venis la telegrafisto post tagmanĝo, laboris la tutan vesperon, aranĝis ĉion kaj foriris. Ekzakte post duonhoron ektondris sonoriloj.

Utkin ekkuris en la korton... Proksimiĝis al la ĉevalejo. Vidas, la seruro surlokas. Li ekkuraĝis, malfermis la pordon. Mallumas. La ĉevalo maĉis. Li trarigardis la plankon. Best-aĉo! — ekkriis Utkin. — Ĝi ja per piedoj tuŝis la signaldratojn. Jen, vidu, maĉas. Almenaŭ nokte ne manĝus. Ĉe ni, homoj, eĉ kiom riĉa persono estus, sed egale ne permesas al si manĝi la plenan diumon.

Porkeco. Vere estas ne ĉevalo sed ia porkaĉo.

Li kiŝis dormi. Apenaŭ sukcesis li ekdormeti — de nove resonoro. Okazis — la katino. Utkin la tutan nokton kuradis nudpiede tien-reen kaj al mateno ekmalŝanis.

"Kio mi nun?" — pensis li, kuŝante vizaĝkusene. — Ĉu mi estas homo? Ĉu mi vivas? Tiel — riverencas antaŭ tiu bestaĉo, sed ĝi regas min. Mi ne manĝas kaj ne dormas. La sanon perdis, oni min de la ofico baldaŭ maldungos. Preterflugos mia juneco vane. La ĉevalo ĉion formanĝis!"

La tutan tagon li kuŝis. Kaj nokte, kiam ĉio eksilentis, li senbrue ellitiĝis, singarde kaj sensone malfermis la eksteran pordegon, poste en la ĉevalejo malfermis la pordon, kaj rapide revenis hejmen. Kovrinte sin plezure per litkovrilo li gaje ridetis kaj gapis al si mem.

... Ekdormis li dolĉe. En sonĝo li manĝis kukojn kun mielo.

Frumatene li vokis serviston kaj per rigora voĉo demandis... — ĉu ĉio estas en la ordo?

— Ĉio!

— Kaj la ĉevalo estas... surloke? — preskaŭ en teruro kriis Utkin.

— Sed kio al ĝi okazos?

— Ne mensogu, vi, aĉulo! Ĉevala sklavo!

— Sed vere ĉio bonordas, sinjoro! Vi ne timu. Ĉevalo via estas surloke. Jam la tutan fojnon formaĉis, nun ovenon volas.

Ĉe Utkin paraliziĝis la maldekstra piedo kaj dekstra mano. Per la maldekstra mano li skribis sur papereto:

"Mi neniun kulpigas, se mi mortos. Min formanĝis la ĉevalo".

La 2-a periodo de esperanta literaturo

Sovetaj
verkistoj

Karaj legantoj!

Sur la paĝoj de nia konstanta literatura rubriko ni daŭrigas la prezenton de verkistoj de la dua literatur-historia periodo, kiun ni komencis pasintjare. Ni planas rakonti ankoraŭ pri multaj eminentaj aŭtoroj, reprezentantoj de diversaj landoj, diversaj skoloj kaj stiloj. Ĉi numere ni komencas prilumi literaturan agadon de verkistoj de soveta skolo de tiu ĉi periodo.

La esperanto-movado en Sovetunio bone prosperis en la dudekaj jaroj, ĝi havis eĉ oficialan subtenon (tiama ministro de klerigado Anatolo Lunaĉarskij estis la honora prezidanto de la Leningrada SAT-Kongreso en 1926). La taŭgaj cirkonstancoj forte influis ankaŭ literaturan aktivecon. Dum tiuj jaroj aktive kaj fruktodone literature agis multaj sovetaj verkistoj: Nikolao Nekrasov, Eŭgeno Miĥalski, Nikolao Hohlov, Vladimir Varankin, Vasilij Eroŝenko, Georgo Deĵkin kaj aliaj.

Nikolao Nekrasov

estis ruso, ĵurnalista. Li naskiĝis 18 dec. 1900 en Moskvo. Esperantisto de 1915. De 1918 li estis prezidanto de Tutruslanda Ligo de junaj esperantistoj. Estis ankaŭ redaktoro de revuoj "Juna Mondo" kaj "La nova Epoko". En la lasta aperis liaj skizoj pri originala E-literaturo, pri aŭtoroj: Baghy, Bulthuis, Jung, Hohlov, Miĥalski, Schulhoff ktp. Kvankam lia kritiko eliris ĉefe el marksisma vidpunkto, sed samtempe li multe analizis la lingvan flankon de la verkoj.

N. Nekrasov multe tradukis konatajn verkojn de rusaj klasikuloj: Puŝkin (romano "Eŭgeno Onegin", "Kupra rajdanto"), Blok ("Dekdu", "Najtingala ĝardeno"), Majakovskij (Nubo en Pantalono, "Suno"), Balmont ("Blanka cigno", "La mortaj ŝipoj") kaj de multaj aliaj.

Li verkis ankaŭ originalajn poemojn. La plej rimarkinda estis "Krono de Sonetoj pri E", "Verda flamo", kiuj montris lin entuziasma adepto de Esperanto. Krome estis "Fablo pri gilotinŝraŭbeto", "Testamento de Satano". En siaj originalaj poeziaj verkoj li estis influanta de rusaj poetoj-simbolisto, precipe de Brusov.

Sube vi, karaj legantoj, povas legi kaj ĝui fragmenton de lia traduka ĉefverko "Eŭgeno Onegin", de A. Puŝkin. Tiu ĉi traduko estis farita tre virtuoze, enhance kaj forme restis fidela al la originalo.

A. Puŝkin

[Fragmentoj]

Eŭgeno Onegin

Traduko de N. Nekrasov

Ĉap. 1 strofo 5

Ni ĉiuj lernis poiome
Pri io ajn kaj iel ajn.
Do per eduko aksiome
Ekbrili povas ni sen ŝajn'.
Onegin estis laŭ deklaro
De pretendema juĝantaro
Instruitito, sed pedant'
Talenton havis li en vant'
De babilad' kun tono prava
Pritrakti ĉion kaj sen ĝen'
Kun la kompetentul'-mien'
Silenti dum diskuto grava
Kaj sinjorinojn kun akklam'
Ridigi tuj per epigram'.

Ĉap 2, strofo. 25

Do, ŝi nomiĝis Tatiana.
Nek per beleco de l' fratini'
Nek per freŝeco ties sana
Atenton tirus ŝi sur sin.
Tre silentema kaj amara,
Timema kiel cerv' arbara,
En sia propra familio'
Knabino fremda ŝajnis ŝi.
Ŝi karesemi ne aspiris
al la gepatroj kun volont'
Infano, en infana rond'
Ŝi ludi, salti ne dezirus,
Kaj ofte sidis ŝi sen plend'
Ĉe la fenestro en silent'.

Ĉap. 8, strofo 43

"Onegin, tiam pli junaĝa,
Pli bona ŝajne estis mi
Kaj mi vin amis, sed domaĝe
Al mi respondis kiel vi?
Per nur severec' laŭpova!
Ĉu vere? Ja ne estis nova
Por vi la amo do knabin'?
Kaj nun - ho, Di! - frostigas min,
Se mi reaŭdas rememore
Predikon tiun en plenklar'...
Sed ne akuzas mi vin: ĉar
Vi agis tiam noblakore
Vi pravis antaŭ mi laŭ ver',
Do mi vin dankas kun sincer'..."

Ĉap. 8, Str 47

"Kaj tiel eblis la feliĉo!..
Sed estas mia sorto-lim'
Jam decidita. Sen sufiĉo
Da singardemo faris mi
Verŝajne: tamen la patrino
Plorpetis tiel min sen fino;
Por mi egaligis ĉiu lot'...
Mi edziniĝis. Amklopod',
Mi petas vin, nun devas ĉesi,
Mi scias: ja en via kor'
Fier' ekzistas kaj honor'.
Mi amas (kial ne konfesi?),
Sed la alia edzas min;
do mi fidelos ĝis la fin."



Ankoraŭ unu el sovetaĵaj verkistoj de la dua periodo, kies kreado meritas senduban atenton, estas poeto Eŭgeno Miĥalski.

Eŭgeno Miĥalski

estis ruso, naskiĝis en Litiĉev (Ukrainio) en 1897. Profesie li estis instruisto kaj bibliotekisto. Miĥalski havis kelkajn literaturajn pseŭdonimojn: Torentano, Revulo, Profetivski.

Li esperantistiĝis ankoraŭ kiel junulo en 1911 jaro, poste aktive partoprenis internacian laboristan movadon, kunlaboris al multaj laboristaj gazetoj: "Internaciisto", "SAT-Organon" kaj aliaj.

En 1917 li mem fondis en urbo Saratov literaturan E-revuon "Libera Torento". En ĝi aperis liaj unuaj originalaj poemoj kaj tradukaĵoj. Lia poezio estis mallaŭtvoĉa, sed tre sincera, poezie ĉarma. Li mem skribis pri si en la poemo "Mi estas...": "Mi estas pokalo de belpoezio, Mi estas martelo de ver'..."

De Miĥalski aperis poemaroj: "La unua Ondo" en 1918, "Du poemoj", en 1922, "Prologo" en 1929, "Fajro kuracas" en 1932. El lia manuskripta volumo "Reforĝo de l' homoj" (1937) restis nur fragmentoj, kaj tute perdiĝis lia volumo "Casanova", en kiu en formo de sonetoj li priskribas la vivon de la fama aventuristo.

E. Miĥalski tre serioze rilatis ankaŭ al tradukado. Li verkis libron "Teorio de Esperanta tradukado". Okaze de la centjara datreveno de la morto de Puŝkin Miĥalski intencis eldoni kolekton de tradukoj de elektitaj verkoj de la poeto. Por la planata libro li mem tradukis poemojn "Ciganoj", "Egiptiaj noktoj", "Fontano de Baĥĉi-saraj" kaj multajn aliajn versojn de Puŝkin. Ĉiuj su-

premenciitaj tradukverkoj restis neeldonitaj.

E. Miĥalski oni nomis "majstro de liberaj formoj", ĉar li estis la unua E-poeto, kiu uzis liberajn versojn kontraste al la klasikaj versoformoj kiel rimoj. Temojn de liaj unuaj libroj li prenas el amo, personaj deziroj. En "Prologo" jam troviĝas socialistaj pensoj, sed en "Fajro kuracas" li grandspire esprimas siajn pensojn pri mondpolitikaj aktualaĵoj. Do, ĉiuj liaj poemoj estas variaj, sed sendume talentaj ka impresaj. Ĉi-sube vi povas legi kelkajn verkojn de Eŭgeno Miĥalski.

Perlas per la belo Stelo-Stilo

Perlas per la belo stelo-stilo,
Kun facile ŝprucas Esperanto —
Gaja tril' de l' najtingalbabilo
Dum trankvilo de l' printempa kanto.
Amo de l' universeca koro
En kristalo de l' penetra penso
Brilnuancas en bukedo-horo,
Sonparfumas en versaĵ-incenso,
Vibras en la melodioj-ĉarmoj, —
Fibroj de l' animo poezia, —
En ĝoj-ploro aŭ maldolĉaj larmoj,
En intimo kun revad' vizia.
Torenteco de l' pasi-deziro
Sur la verda kampo de la amo,
Radicco de l' revad-inspiro
Kaj neniam foriĝanta flamo.
Antaŭ la ĝardeno de l' beleco,
Permanenta celo al grandozo,
For de l' korpo en la animeco
Estas mia farnient-ripozoz.

Ajno

[Fragmento]

Rapide

Streĉvervas muskoloj...
Posthorizontas la suno.
Krepuskas la kor'
en sopiro.

Golgotas la vivo.

Nigras du krucoj.
Grakas amasoj da korvoj,
sentante mortontojn.

Manon al mi, amikino,
lipojn sur lipojn
de l' ama konfid'.

Golgotas la vivo ...
Nigras du krucoj...

Knaras radoj, krakas pordoj,
fajfsirenas aŭtoĵoj...
Brilas vitroj magazenaj ...
Kalvas plaĉa rond'.
Ĉielenas templa pinto
reliefe.
La dekdua.

Estingiĝas lun'.
Glitas ombroj fantomecaj,
malaperas en la grizo
de nebula ŝalo.
Ŝi kaj mi
en densa maro
de banalo.
Dereliĝis tramvagono —
kaj ekbluis la fajrero;
tra la grizo kri' eksonis,
kri' de malespero.

Golgotas la vivo.
Du krucoj, —
Ŝi kaj mi.


(1929)

Irina Porotova

Esperantigis
**Fjodorova
Marina**
[Visim, Rusio]

Fabelo pri du disigitaj koroj

*Ili amis unu la
alian, sed neniu
volis konĝesti tion
al la alia*



Sadretdinova Naila [Voronĉ, Rusio]

Vivis du homoj. Ili amis unu la alian, kiel neniu en la mondo.

Sed foje ili kverelis, ĉar estis junaj kaj ankoraŭ ne sciis pardoni. Ili estis fieraj kaj neniu volis proksimiĝi la unua, sed al ili estis ege malfacile, ĉar ili ne povis vivi unu sen la alia.

Unu el ili estis pli malforta kaj pli malgranda, kaj por li estis eĉ pli malfacile. Liaj manoj volis etendiĝi al la Granda Homo, kiam tiu senzorge paŝis preter; la Malgranda Homo gaje ridetis, ŝajne kaptinte rideton de la Granda, direktitan al iu alia...

Kiam al la Malgranda Homo iĝis tute malbone, li iris en sian ĉambron, ŝlisis la pordon kaj falis sur la liton. Li enŝaltis muzikon tre laŭte, ke oni ne aŭdu, kiel li ploras, por ke ĉiuj pensu, ke al li estas gaje...

Kaj kiam ĉe la sekva mateno al lia pordo frapis la Granda Homo, la Malgranda renkontis lin kun sekaj okuloj kaj digna mieno. Li ne ĵetis sin al kolo de la Granda, ne brakumis lin, malgraŭ, ke deziris fari tion la plej forte el ĉiuj aliaj deziroj.

La Granda Homo foriris, memfida kaj bela, surprizita pro la malvarmeco de la Malgranda Homo.

Kaj la Malgranda Homo rigardis lin kaj pensis: kiel bonas havi tian malvarman koron, kiel bonas nenion rememori, pri neniu pensi. En iu momento li volis postkuri la amikon kaj preni lian manon... Sed li sciis, ke la Granda Homo ne plu amas lin.

... Malgranda naiva koro de la Malgranda Homo frakasiĝis je tiom malgrandaj pecetoj, kiujn jam ne eblis kunigi...

Kaj en la najbara domo tre laŭte bruis muziko el magnetofono en la manoj de la Granda Homo kun malvarma koro. Tiel laŭte, ke eĉ tremis la ŝlосita pordo.



Leksina Ludmila

[Suda, Rusio]

Besta alfabeto

*Daŭrigo. Komenco (A,B,C)
en la numero 8-2001***Ĉ**

Ĉashundo ĉevalon ĉagrenis.
Ĉimpanzo ĉashundon ĉenis.
Ĉashundo ĉagreni ĉesis.
Ĉimpanzo ĉiam ĉefis!

D

Dancantaj delfenoj
Dancantaj damaoj
Dancas dandante
Dancas distrante.
Dancas dipod' delikata.
Dancas dazip' dikiganta.
Dancas dogo-deloganto,
Dromedaro - diletanto.

E

Elefanto eleganta
Ebriete entrudanta,
Edzineton elektanta
Estas ege eraranta:
Elektanta edzino
estas erinacino.

F




Fianĉiĝis fraŭlino,
Fianĉiĝis fazanino.
Fieris forta falko!
Formanĝis fazaninon,
Formanĝis fianĉinon
Feroce fremda furo.
Funebris fianĉinon,
Funebris fazaninon
Fidela forta falko...

AMUZA GRAMATIKO

Perevalov Jurij [Lesnoj, Rusio]

Jurij Perevalov kolektis la vortojn, kiuj diferencas unu de la alia nur per unu litero-vokalo. Por oni ne eraru kaj misuzu ilin, li elpensis ŝercajn komentariojn kaj ilustris la aferon per humuraj bildetoj.

Daŭrigo. Komenco en la 8-a numero de "K"-2001

 <p>Litero A en la vorto kato estas dometo por kato.</p>	 <p>Litero O en la vorto koto estas fenestro de lav-masino, kiu forigas koton.</p>
 <p>Pli bone estas dormi ol atendi. La litero A en la vorto memorigas liton. Hr-r-r-r...</p>	 <p>Estas bone etendi la korpon sub la karesema somera suno... La litero E en la vorto Etendi jam etendiĝas.</p>
 <p>Litero a en la vorto Mano similas infanan kaleŝon, kiu ĉiam estas amiko por zorgemaj gepatraj manoj.</p>	 <p>La litero O en la vorto Mono antaŭsciigas, ke moneroj estas rondaj. Ne faligu ilin sur plankon - ili povas forruliĝi sub ŝrankon.</p>
 <p>La litero A en la vorto Apero similas aliplanedan kosman ŝipon. Ĝia apero en la ĉielo pruvos, ke ni ne estas solaj en la kosmo.</p>	 <p>La litero O en la vorto Opero similas la vaste malfermitan buŝon de opera kantisto.</p>

Substantivo

Laŭ PIV - Plena Ilustrita Vortaro substantivo estas:

Vortspeco, prezentanta la ideon de aĵo, abstraktaĵo, ago aŭ stato, konceptata en la spaco (ekzemple: homo, beleco, kuro, dormo ktp).

Nia leganto **Noskov Anatolij** [Zeja, Rusio] provas montri, kiel prezentus tiun difinon de la substantivo diversaj nacioj per siaj popolaj versaĵoj:

Brita limeriko

Troviĝas nocio en PIVO
Rakontas ĝi pri substantivo,
ideon de aĵo,
kaj la abstraktaĵo,
Plus ago kaj stat' perspektivo.

Rusaj ĉastuŝkoj

En la vivo perspektivo
Mankas sen la substantivo,
Por ideo de la aĵo
Bezonatas abstraktaĵo.

Pro la ago aŭ stato
Ni parolas sur la strato.
Konceptata en la spaco
Fin' de l' strat' aperas placo.

Japanaj hajkoj

La substantivo...
Ideon de aĵo kaj abstraktaĵon
prezentas ...

Stato aŭ ago en la spaco
Homo, beleco, kuro, dormo
Ekzemple...

Kaleval'

Dum la tuta homa vivo
Gravas rolo substantiva
Pri ideo de la aĵo
Ĝi rakontos kaj priskribos
Abstraktaĵon. En la spaco
Staton aŭ agon belan.
Homo. Domo. Dormo. Kuro
Jen la viva aventuro...

Orientaj versoj (Rubaji) ...

En vortaro mi trovis la vort' abstraktaĵon
Por la homoj ĝi montras ideon de aĵoj,
La plej gravas noci' en la vort-kolektivo
Kiel tio nomiĝas? Ho, jes! Substantivo.

Naumovič Svetlana [Tjumeno, Rusio]



Eble ankaŭ
mi leznu
Esperanton

?

*Kaj jen al via atento — terce-
filozofia poemo, kies sencon
transdonas nur substantivoj.
(Laŭ motivoj de poemo de Aleksij
Molotov)*

Komedio de l' homo

La patrino,
Kant',
Lulilo,
En la man' infanludilo.
En lernejon promenado.
En kajero ekzercado.
La fiero de l' gepartoj.
En somero biciklado.
Ĉe l' rivero ripozado.
Aŭtuno. Lecionoj.
Konoj pri Napoleono.
Gramatiko. Historio.
Bonhumuro. Vivavido.
La lernejo - ĝis revido.
En lernado permanento
Abituriento. Universitato.
Ekzamenoj. Kandidato.
Studentiĝo. Konatiĝo.
Lecionoj. Sporttrejniĝo.
Post tri jar' bakalaŭriĝo
Kantoj. Dancoj. Enamiĝo.
Kun bopatroj konatiĝo.
Kaj en fino — edz(in)iĝo.
Mielmonata surŝipiĝo...
Ĉe la maro ondoj, mevoj.
En ofic' laboro. Devoj.
Kontoj. Ŝparoj. Aŭto. Mono.
Por infanoj pensbezono.
Por ripozo ne sezono.
Ŝakoludo kun bopatro.
Premiero en teatro.
Televido ĉe fotelo.
Aĝo... Vivokaruselo.
Emerito. Memorado.
Sur la kap' de har' arĝento.
Pri l' havaĵo testamento.
Ĉerko.
Tombo.
Monumento.

Neelpensitaj historioj

Okazintaj *al* aŭ tradukintaj *de* niaj legantoj

Trovis in interreto kaj esperantigis

Kolotov Nikolao

[Kaĉug, Rusio]

Reala fakto

Jen,
kaptis
fiŝojn...



Antaŭ kelkaj jaroj, vendrede, paro da laboristoj de la kompanio "BOING" forŝtelis de la uzino pompeblan sav-floson por "Boing-747", por uzi ĝin dum la fiŝkaptado. Sekvontage venis ili al la lago, ektiris ŝnuron, la floso pumpiĝis kaj ili eknaĝis fiŝkapti. Kaj post unu horo super ili ekŝvebis sav-helikoptero, kiu ricevis signalon de la radio-elsendilo, per kiu oni nepre provizas tiujn sav-flosojn kaj kiuj ekfunkcias aŭtomate ĉe la pumpado de la floso.

Memkompreneble, la laboristoj devis serĉi por si aliajn laborlokojn.

Martin Ginette

[Saulhures/Moselotte, Francio]

Sen pantalono

Iam, mi aĝis 9 jarojn, mi iris al la lernejo matene. Survoje, piedirante kun miaj kamaradinoj, mi subite konsciis, ke mi forgesis vesti mian kalsoneton. Kion fari? Mi estis preskaŭ ĉe la lerno-domo kaj malproksime de la mia.

Mi ekĝemis, kaj la najbarino, kiu loĝis apude, pruntedonis al mi iun kalsoneton de sia filino.

Ĉu vi kredas, ke la rakonto estas finita? Tute ne, ĉar kiam mi estis laboranta en la lernejo ĉe mia skribotablo kaj ĉiuj lernejoj laboris silente, kaj en la granda silento de la klas-ĉambro aŭdiĝis frapo ĉe la pordo. Kaj mia patrino eniris kaj laŭte solene deklaris: "Mi alportis la kalsoneton de Ginette, ŝi venis sen ĝi". La tuta klaso ŝtoniĝis, kaj la instruistino diris al mi: "Iru en koridoron kun via patrino". Tie mi povis klarigi al la patrino, ke la problemo estis solvita de la najbarino, ke ŝi povas trankviliĝi. Sed miaj kamaradinoj vere spertis grandan frustracion kaj ve-spiris: "Kia bedaŭro, ni forgesis rigardi sub la jupon, kiam ŝi supreniris sur ŝtuparo!" Bonŝance, neniu mokis min pro la grava forgeso. Mi vere havis bonajn kamaradinojn.

Bill Thorne [Londono, Britio]

Venĝo

Tiutempe (1957) en Londono ekabundis malgrandaj fabrikoj kaj uzinoj pri produktado de tre diversaj aferoj. Mi laboris en unu el tiaj entreprenoj. Foje al nia uzino aliĝis Brindley Mozart Williams, aŭ simple Brin. Li estis granda ŝerculo.

Unu membro de la uzino estis eksa policano. Li deĵoris kiel gardisto, kaj intertempe, kiel inspektoro de varoj, kiujn ni fabrikis. Li havis propran etan ĉambron, en kiu li povis mezuri kaj kontroli kaj meti en ordo la partojn.

Unu vesperon Brin kaj mi daŭris labori sole, pasis du horoj post la fino de la tago. Ni jam laboris dum dekunu horojn. Brin prenis buŝharmonikon el tirkesto, do mi ekprenis manfaritan gitaron, kaj ni ludis nur kelkajn notojn kune. Tuj envenis nia gardisto por kontroli ĉu la fenestroj estis fermitaj ktp, kaj ŝajnis al li, ke ni ambaŭ jam arlekenis, kaj la venintan matenon li plendis al nia ĉefo. Feliĉe, nia ĉefo konis nin bone, kaj povis vidi ke niaj taskoj estis faritaj, do ignoris la plendon.


Unu tagon, la gardisto sidis en lia ĉambro, kaj laboris kviete. Lia pordo (kiu svingis ekstere) malfermiĝis silente.

Granda armea "Tondra-piroteknikaĵo" rulis mole en la ĉambron ĝis sub lia seĝo. La pordo fermiĝis silente, kaj koinĝis per alia seĝo trans la koridoro.

Kiam la eksplodo okazis, la tuta konstruaĵo skuis. Homoj kuris tien kaj reen, demandante: "Kio okazis?"

Nia gardisto ne povis eskapi el lia ĉambro, kiu nun estis plena da densa griza fumo. Fine oni ekprenis la seĝon kaj malfermis lian pordon. Li aperis el dika nubo; li ne povis diri ion; li nur staris, rigardanta; lia buŝo estis malfermita, nepovanta eĉ ion prononci.

Estis mistera afero. Kiu kulpis?



Bill Thorne [Londono, Britio]

Tempo kaj homoj

Demandis bestoj ĉe la homo:

— Kio estas la plej valora por vi, homoj, en la vivo?

Kaj homo respondis: "Tempo".

— Sed kion vi plej malalte taksas en la vivo? —

"Tempon".

(el "Fabeloj de maljuna tajloro")

Karaj legantoj! Ni volas proponi al vi temon por la kreado kaj memesprimo: "Tempo kaj homoj". Ni opinias ke tiu temo iel rilatas al ĉiu, sendepende de aĝo, profesio kaj geografio, kaj estas eterna kiel la Tempo mem. Bonvolu skribi al KOMENCANTO viajn pensojn kaj spertojn pri tiu temo en ajna formo: historietoj, tradukaĵoj, versoj, proverboj, aforismoj, ŝercoj, bildoj ... Ni plezure publikigos ilin.

Por la komenco ni volas prezenti al vi konsilojn el la libro de germana aŭtoro *Lothar J. Seiwert* "La aboco de tempoplanado". Ĝi aperis en multaj lingvoj kaj UEA eldonis ĝin en Esperanto ĉe la serio Konsilaroj por Aktivuloj [UEA, Roterdamo, 1995].

Do! Ĉu vi scias, ke:

Tempo ne estas aĉetebla

Tempon oni povas nek ŝpari nek stoki.

Tempon oni ne povas multobligi

Tempo foriĝas kontinue kaj por ĉiam senrevene

Ĉiu homo havas la saman tempo-kvanton, sed la tempo hodiaŭ ŝparita ne estas stokebla, do ne povas esti konsumata morgaŭ aŭ alian tagon.

Homo havas je sia dispono maksimume ĉirkaŭ 200000 horojn da ankoraŭ planebla tempo.

La regulo 80:20

Tiun ĉi interligon pri la 80:20-regulo unuafoje priskribis la itala ekonomiisto Vilfredo Pareto en la 19-a jarcento.

20% el la klientoj aŭ varoj rezultigas 80% el la spezoj
 20% el la gazetoj entenas 80% el la novaĵoj
 20% el la kunsida tempo produktas 80% el la decidoj
 20% el la laboro ebligas 80% el la laborsukceso
 20% el la loĝantaro posedas 80% de la popola havaĵo

Tial trovu 20% de viaj la plej gravaj aferoj kaj donu por ili 80% de via tempo!

La ĝenerala praktiko de la entreprena praktiko montras, ke oni per pli da tempo por planado bezonas malpli da tempo por realigo kaj tiel entute ŝparas tempon.


Tiu, kiu preparas dum 8 minutoj sian labortagon kaj poste konsekvence plenumas ĝin, povas gajni unu horon da tempo ĉiutage por gravaj aferoj.

Tempo por planado	Tempo necesa por realigo	
Tempo por planado	Tempo necesa por realigo	Tempo gajno

Alia spertoregulo asertas, ke por laboro estas ofte bezonata tiom da tempo, kiom estas je dispono.

Sorto alie agas, ol oni imagas!

Planu plene nur difinitan parton de via labortempo, laŭsperte ĉirkaŭ 60% (baza regulo de tempoplanado). Neatenditaj eventoj, ĝenfaktoroj, tempo-ŝtelistoj kaj privataj bezonoj postulas, ke oni ne tute forplanu sian tempon.



Proverboj pri tempo

Ĵoje minuto iĝas atuto.


Dum tuta ĵazo nenia ĵazo.

Ŝparita horo – por alia laboro.

Venis inundo dum unu sekundo.

Diuznon post diuzno ne ĵetu en zubuznon.

Estu prudenta en ĉiu momento.



Bill Thorne [Londono, Britio] filozofiumas pri graveco de minutoj ĉe urbaj stratoj

Aforismo estas frato de anekdoto, amiko de paradokso kaj filo de saĝeco

(N.Neksin)

AFO[☹]RISMO[☺]J

Tempo estas...

Kiom da tempo ni perdas! - sed la jaroj plusiĝas.

{Emil Krotkij}

*

La homoj ofte ne scias, kion fari pri la tempo, sed la tempo bone scias, kion fari pri la homoj.

{Magdalena Samozvance}

*

La tempo estas mono, sed mono tamen pli agrablas.

{A. Berdiĉevskij}

*

"Al vi ĉiam ne sufiĉos aŭ tempon, aŭ monon."

{La leĝo de Lerner}

*

Ju pli bela estas virino, des pli rapide forŝugas tempo kaj mono.

{Maksim Zvonarjev}

*

En la vera bombo kun la horloĝa mekanismo la tempo estas la eksploda materialo.

{Stanislav Jeĵi Lec}

*

La vivo estas eterno en miniaturo.

{Ralf Emerson}

*

Neevitebleco de morto parte mildiĝas dank'al tio, ke ni ne scias, kiam ĝi atingos nin; en tiu necerteco ekzistas io de senfineco kaj de tio, kion ni nomas eterneco.

{Jan Labriuer}

*

Averaĝa homo, kiu ne scias, kion fari pri sia vivo revas pri ankoraŭ unu vivo, kiu daŭrus eterne.

{Anatol Frans}

*

Ne eblas haltigi tempon — tion ne permesos la horloĝa industrio.

{Stanislav Jeĵi Lec}

Belousov Igorj

[Marks, Rusio]

Anonco apud labora loko de burokrato:

Eniru neofte,
Parolu koncize,
Petu malmulte,
Foriru rapide.

*

Loŝmanov Anton

[Komsomolsk-sur-Amuro, Rusio]

Unu el plej malfacilaj perdoj estas perdo de tempo.

{Bjuffon}

*

Tion, kion mi aŭdas, - mi forgesas.
Tion, kion mi vidas, - mi malforgesas.
Tion, kion mi faras, - mi komprenas.

{Konfucij}

*

Sperteco estas instruisto, multekosta, sed neniu instruas pli bone ol ĝi.

{T. Karlejl}

Kasimov Firdaus [Permo, Rusio]


Por esti riĉa bezonatas tri kondiĉoj — saĝo, talento kaj mutle da mono.

*

Fari virinon feliĉa estas facile, malfacilas resti dum tio feliĉa mem.

*

Iuj post la jaroj iĝas pli saĝaj, aliaj - pli aĝaj.



LERTA RUSA IDEO - ARTEFARITAJ LUNOJ POR REFLEKTI SUNLUMON.

Bill Thorne, [Londono, Britio]



Jeffimova Elana

[Zajcevo, Rusio]

Ebria viro revenas hejmen malfrue nokte. La horloĝo batas tri foje.

— Mi mem scias, ke estas la unua postmeznokto. Ne necesas al mi trifoje tion ripetii!



Kasimov Firdaus

[Permo, Rusio]

Leŭtenanto Rjevsky estas fama heroo de rusiaj armeaj anekdotoj.

Al Rjevskiy ĉe la strato sinturnas juna virino kaj diras:

— Ŝajnas, vi estas patro de unu el miaj infanoj...

— Ĉu mi... de la via !?!

— Sed ne timu vi tiel! Mi estas lerneji-instruistino...

Oni demandas ĉe Rjevsky:

— Leŭtenanto, ĉu vi havas iun revon?

— Jes... Mi neniam posedis bienon, sed tiel volas ĝin fordrinki!



— Leŭtenanto, ĉu vi ne volas trinki?

— Kial ne?

— Nu ne, do ne.

Loŝmanov Anton

[Komsomolsk-sur-Amuro, Rusio]

— Kelnero, bonvolu doni al mi bifstekon.

— Kun plezuro.

— Ne, kun mustardo!



Mi estas 50-jara, mi naskiĝis la 5-an de majo, mi loĝas sur la 5-a etaĝo, mi havas 5 infanojn. Tial mi metis 5 dolarojn je la ĉevalo, kiu iris kun la 5-a numero ...

— Ĉu ĝi venis la 1-a?

— Ĝi venis la 5-a!

Puŝkarjov Valentin

[Ekaterinburgo, Rusio]

— Se mi povus revenigi monon, kiun mi fordrinkis dum tuta mia vivo!

— Kaj kio okazus?

— Ha! Kiom plezure mi povus ilin fordrinki denove!



Poŝtisto venas al pordeto kaj vidas surskribon:

"Singarde, hundo!" Li rigardas al ĝardeno kaj vidas nenion hundon. Singarde li eniras kaj tuj aŭdiĝas hunda hurlo.

El al domo aperas majstro kaj kriaĉas tutkorte: "Ĉu vi blindas? Vi estas jam la tria, kiu surpaŝas sur la hundon! Ja, estas skribite: "Singarde!"

Trafikaj ridoj

Duopo malfruas al la trajno kaj rapidas.

— Kiom restis ĝis la forveturo?

— Dek minutojn.

— Sed laŭ mia horloĝo — kvin...

— Nu, tiam vi certe ne sukcesos al la trajno.



— Ne saltu, dume la tramo ne haltos.

— Sed mi rapidas al hospitalo...

— Do, tiam bonvolu...



Unu homo havis nenovan aŭton. Foje matene li vidas sur sia aŭto estas per najlo gratita frazo: "Farbu vian aŭton" La posedanto pensas: "Vere, jam tempas refarbi ĝin". Li vizitas aŭtoriparejon. La aŭto ekbrilas kvazaŭ tute nova. Sekvontmatene li trovas sur la aŭto gratita.

"Nu, jen, estas tute alia afero!"



Al la vojkrucio alveturas fraŭlino, bremsas, preterlasas la verdan koloron de la signal-lampo, poste la ruĝan, poste denove la verdan, poste denove la ruĝan. Proksimiĝas policano kaj afable demandas:


— Ĉu fraŭlino preferas iun alian koloron?



Iu fraŭlino veturas en la aŭto, ŝaltas radion kaj aŭdas:

Vi aŭskultas radion "Eŭropo plus"

— Diable, sed de kie ili scias tion?



Bill Thorne [Londono, Britio]

Invitoj kaj informoj

Brazila Esperanto-Ligo

Al la tutmondaj E-artikolverkistoj:

Se vi estas e-artikolverkisto kiu verkas aŭ iam verkis argumentartikolon favore al Esperanto en via nacilingvo, ni petas de vi la specialan komplezon sendi ilian tradukon en Esperanto al Brazila Esperanto-Ligo.

La artikolojn ni metos en datum-bankon por riĉigo de nia biblioteko, por regula dissendado al la brazila gazetaro kaj por aperigo en nia spaco ĉe Interreto, laŭ plano de la novaĵagentejo ĵus kreita de Brazila Esperanto-Ligo.

Poŝta adreso:

Cx. Postal 03625-Brasilia (DF) – Brazilo – CEP 70084-970

Elektronika adreso:

belkomunikado@esperanto.org.br

Ĉina Radio Internacia

Kun ĝojo ni informas vin, ke por faciligi korespondadon kaj ŝpari la afrankon de aŭskultantoj nia Radio decidis starigi poŝtkeston en la landoj, kie troviĝas raportista stacio de Ĉina Radio Internacia. Oni transportos al ni viajn leterojn kaj aŭ aliajn poŝtsendaĵojn. Bonvolu uzi la poŝtkeston kaj diskonigi tiun ĉi informon al esperantistoj en via lando.

Служба на Эсперанто
Международного радио Китая,
Корпункт МРК, Ул. Переяславская, 7
кв. 105, Москва, 129110
<espradio@com.cn>

Jubilea Kongreso de ELNA

Esperanto Ligo
por Norda Ameriko
21-24 junio 2002
Sacramento CA, USA

Partoprenu aŭkcion

Nepre festu kun ni dum ĉi tiu grava jaro. Ni festos la 50an datrevenon de la naskiĝo de ELNA en la urbo de la naskiĝo.

Aliĝilojn por kaj la ELNA-kongreso kaj UK petu de la Centra Oficejo de ELNA.

Partoprenu la Kongresan Aŭkcion Dum la 50a Kongreso de Elna Okazos Aŭkcio kaj ni invitas ĉiujn donaci esperantaĵojn taŭgajn por tiu aŭkcio.

La Aukcia enspezo estos disdonata al la Historia Fonduso, al USEJ – la junulara E-organizo en Usono.


Do, traserĉu viajn kestojn kaj trovu tiun forgesitan sed ŝatatan E-trezoron por ke ĝi reeniru en esperantujon kiel movada subtenilo. Se vi partoprenos la kongreson bonvolu alporti viajn donacojn al la konreso. Se vi ne partoprenos – bonvolu sendi ilin, kune kun viaj nomo kaj adreso, al

Henry Studer
908 Villanova Dr.
Davis CA 95616
USA

USA

USA

Listo de donacoj, donacintoj kaj gajnitaj monsumoj aperos en postkongresa Esperanto USA.



La 24-a Ĉebalta Esperantista Printempo

08-16.06.2002

Pola Esperanto-Asocio Filio en Koszalin organizas en la tagoj 8-16 de junio 2002 la 24-an Ĉebaltan Esperantistan Printempon kun riĉa E-Programo kaj aktiva ripozado ĉe la maro.

Sablriĉa strando kun altiĝantaj dunoj, verda strio de pinarbaro, granda lago kaj saniga mikroklimato kun aero saturita de jodo.

La programo antaŭvidas: Interesajn prelegojn, konkursojn kun valoraj premioj, ekskursojn al vizitindaj urboj, ĉiutagan lingvoperfektigadon kaj kantadon. Estos sufiĉe da tempo por promeni kaj sunumi. Internacia vespero. Bv. kunporti esperantaĵojn por eta aŭkcio.

Loĝloko: Gastama ripozcentro de Polaj Sportteamoj, 12 km nordokcidente de Koszalin.

Loĝkondiĉoj:

Loĝado en dulitaj, bone ekipitaj ĉambroj kun propraj lavujoj. Partoprenkotizo inkluzivas oportunan loĝadon, bongustajn manĝojn (tri manĝoj potage), kongresajn materialojn kaj riĉan E-Programon. kaj varias de 150 ĝis 240 eŭroj.

Dum ĈEP-aranĝo la Ripozcentro estos okupata nur de e-istoj. Vera esperantista etoso atendas vin.

Karaj Gesamideanoj!

Ne perdu la okazon, venu al Mielno!

Petu detalajn informojn kaj la aliĝilojn ĉe:

Pola E-Asocio, Box 30, &%-015
KOSZALIN-1, Pollando
Telefono: 094 / 3404-563
(s-ro Baranowski)

Horaro de Esperanta disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia

UTC	regionoj	Ondoj (m)	kHz
11:00 11:30	Japanio, Koreio	41,84	7170
		41,96	7150
13:00 13:30	Sudorienta Azio	25,75	11650
		19,72	15210
20:00 20:30	Eŭropo	41,29	7265
		30,11	9985
22:30 23:00	Latin-Ameriko	30,43	9880
		25,84	11700

Anoncetoj

Informoj

Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj aŭ 2 IRK por eksterlandanoj. Por abonantoj de "K" - senpage.

Inĝeniero pri konstruado
dez. kor. kun gesamideanoj el
la tuta mondo.

Jacques Yende
Boma Esp-Rondo
RVM. B.P. 91,
Boma,
Kongolando

Ŝatus korespondi
16-jara litovino

Aida Kruzinauskaite
Roziu 45,
LT-4270
Vilikaviskis
Litovio

54-jara edzino kaj
patrino ŝatus korespon-
di kun diversaj landoj

Laima Cirvinskene
Dvarelikiu 12,
LT-5250 Pasvalys
Litovio

36 jara fraulo,
komencanto dez.
korespondi

Ts. Batzaya,
PO Box 57,
MN-210646,
Ulaanbaatar
Mongolio

Grupo da infanoj ŝatus
korespondi kun aliaj infanoj pri
div. porinfanaj temoj

E-klubo "Espero",
Dom Kultury
Ul. Zwirkii Wigury 2
PL-32650 Kety,
Pollando

Emeritulo serĉas sam-
idean(in)on por korespondi pri
ĉiutagaj aferoj.

Geoffrey Ball
107 Ingrave Road
Brentwood, Essex, CM
15 8BA,
Britio

Koresponda Servo
de Internacia Fervojista
Esperanto-Federacio

In° Sorin Porupca
St. Mihail Bravu, 32/2
RO-6200
Galati
Rumanio

Korespondi tutmonde
deziras s-ino

Anna Kornjubina
Molodjonnaja, 32-6
Barnaul
656015
Rusio

Pečenina Irina [Kamensk-Uralskij, Rusio]



Deziras korespondi

Wieslaw Michalak,
Wallenroda 7/43
Lublin
PL-20607
Pollando

14-jara komencantino, dez.
kor kun usonanoj

Margarita Derban
52 Kwartal 12-24,
RU-660068
Krasnojarsk
Rusio

simoron@son.ru

Mi plezure interŝangos opiniojn
pri la instruado de lingvoj kaj aliaj
fakoj per E-to; la kur-so EKU!
ofertas bazon por ili.

Annice Szrajzman
37 Graham Road,
Mitcham, CR4 2HB,
Britio

Eblas senpage tranokti

Jan Skonieczka
Ul. Chłodna 23a,
PL85-345
Bydgoszcz
Pollando

Skonpres@poczta.onet.pl

KOMENCANTO

2009

16 paĝoj

kolora kovrilo

famaj esperantistoj

historio de E-literaturo

gramatiko serloze kaj ŝerce

amuzaj rakontoj

proverboj, aforismoj

anekdotoj

adreso

multaj multaj bildoj

Por aboni "K"-n kontaktu vian landan peranton

UEA-konto "VKUD-A"

eblas abonpigi rekte al la redakcio per monbiletoj aŭ IRK — kondiĉoj sur la paĝo 2

